

MAZINGIRA
P.O KESTO 51,BUNDA. TANZANIO



Retadreso: smbmramba@yahoo.com , Tel: +255 755 076596
Retpaghoj: www.kono.be/mazingira/eo
<http://www.verduloj.org/mazingira.htm>

Oktoebro 2017-10-10

Estimataj subtenantoj de Mazingira .

Jen la raporto pri la laboroj faritaj de Mazingira dum la periodo de Oktoebro 2016 ghis Septembro 2017.

Antaŭparolo:

Koran dankon al chiuj kiuj subtenis la projektojn de Mazingira dum la tio chi periodo, inter ili estas:

La Franca asocio Solidareco Afriko-Azio de Boris Bouchez, Maryvonne kaj Bruno, Bart Demeyere, D-ro Manfred Westermayer por AVE, Malcolm Jones, Snorre Benum, Ivo Durwael, Christiane Lamy, Ivo Durwael, Andre & Colette Weiss, la anoj de la Esperanto-plus la Nederlanda fonduso www.mazingira.nl kaj chiuj kiuj kontribuis por ebigi la okazigo de la 6a Afrika kongreso de Esperanto kiun okazis en Tanzanio fine de pasinta Decembro ktp, kaj mi esperas ke vi daurigis vian subteno al Mazingira ankaŭ por la venonta periodo de 2018.

Dum la lasta semajno de la pasinta jaro, okazis en Bunda urbo la plej memorinda kongreso de Esperanto de UEA en Afriko, ghi estis la plej granda kaj plej varia el la ghisnunaj afrikaj kongresoj. Tio esti la 6a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA kiun komencis en la 24a ghis la 31a de Decembro en kiu cheestis la okdeko da partoprenintoj el 14 landoj, multaj ekster la Afrika kontinento de (Brazilo, Francio, Hungario, Koreio, Islando, Japanio). Afrikanoj venis el ok landoj la granda plimulto kompreneble el Tanzanio, kun forta reprezentado de lokuloj el la urbo Bunda, kaj iom de aliaj regionoj de Tanzanio ktp. La malferma ceremonio okazis en merkredo, la 28an de decembro, shovita unu tagon pro la malfruigo de la alveno de la 11-persona korea karavano. La solenajho dauxris preskaux kvar horojn, kun multaj salutoj, vivaj (Afrika Komisiono, prezidanto de LKK, la vicprezidanto de UEA kaj aliaj) kaj lautlegataj (de la Prezidanto de UEA, de ILEI, de IKEF kaj la korea grupo kaj JEI.) La honora gasto en la malfermo estis s-ino Lydia Simeon Bupilipili, la Distrikta Komisiito por la distrikto Bunda. shi estis en la lastaj monatoj nomumita de la shtata prezidento, d-ro John Pombe Magufuli. shi parolis en la svahila kun traduko, kaj kun kelkaj frazoj en Esperanto. Temis grandparte pri evoluigaj projektoj Dank al subteno de Esperantistoj en la distrikto faritaj de la organizo Mazingira pere de S-ro Mramba Simba – pli bona akvo-mastrumo, lernejoj, infrastrukturo. shi varme bonvenigos la engaghighon de esperantistoj en tiuj taskoj – influita per vizito en la antaŭa tago al la Esperanto-Mezlernejo lernejo en la vilagxo Marambeka (40 km de Bunda).

Diskonigo de la kongreso okazis tre efike per grandioza futbalmatcho, kiu altiris almenau kelcentoj da lokulojn. Nesurprize, char la esperanta teamo, en belegaj verd-blankaj uniformoj, ludis kontraŭ la loka teamo, 'Bunda Veteranoj'. Konigo de la lingvo klare okazis; dum (sola) alpromeno, pluraj urbanoj kriis "Esperanto!" Esperanto!" kaj ecx "Saluton!". La verda teamo ludis solide en la unua duono kaj arigis du golojn kontraŭ nulo, kio rikoltis entuziasmajn kriadojn kaj banderolumadon de la esperantistoj. Sed tra la dua duono, ni rimarkis la nesfichan eblon por la Esperanto-teamo ekzercadi kaj provludi kune; ili eklacighis kaj ne sukcesis reteni la pilko-posedon. La fina rezulto (4-2 favore al la Bunda-anoj) ghojigis la spektantaron – chio finighis en bona etoso. La publiko kontinue audis la vorton 'Esperanto', char la matcho ricevis lautparolilan komentariadon – alterne au samtempe en la svahila kaj Esperanto. Tra la lastaj tagoj okazis ekzamenoj de UEA/ILEI. 25 bravuloj prezentis sin por la antaŭtesto, el kiuj 20 rajtis plui. En la unua nivelo, ok el la dek du provantoj sukcesis; en la dua nivelo, chiuj ok provantoj atingis sukceson, kun iom similaj kaj altaj poentaroj. Entute bonis la lingva nivelo. Verdire okazis multaj programeroj, kiujn ne eblas mencii chiujn .

Raporto pri Mazingira 2017:

Dum la periodo okazis multe da suno en mia regiono, multaj homoj suferis pro manko da nutraĵoj, la plantoj en kampoj ighis sekaj kaj tre malbonighis la rikoltoj, tre altighis la prezoj de maiz-faruno, kelkaj familioj manghis nur unu fojo po tago,ghis nun ankoraŭ daŭras la nekutima sunsezono.

Operacio de infanoj kun misformigho;

Mi kore dankas S-ino Christiane Lamy kaj D-ro Manfred Westermayer, kiuj subtenis la operaciojn de infanoj kun misformitaj piedoj dum tio periodo esperante ke ili daurigos la subtenon al infanoj kun la samaj problemoj en 2018. (Mi tamen ghojas ke malkreskas la nombro de tiaj infanoj kun misformigho).

Radio projekto; La radio “Mazingira Fm” en la jaro 2017 daŭre elsendas la programojn por la tuta regiono sen problemoj,

Agrikulturo projekto: Pro multe da suno dum 2017, la sunflora projekto de Mazingira ne bone funkciis, mankis pluvo kaj pro tio ni kolektis malmulte da sunfloraj semojn kiujn ni premis kaj gajnis nur 4,500,000 Tz shilingojn kiun mi elspezis por akceto de nova put-borilo ,kaj parto de tio mono ni elspezis por subteni la konstruadon de lernejo..

Sano : Mi dankas al Ge-sroj Andre & Colette Weiss, kiuj daŭre mon-donacis por pagi la san asekuron al 15 malrichajn familiojn kaj S-ro Matrin Markerian el Francio kiun vizitis mian vilaghton Marambeka kaj donacis mikroskopon kun aliaj kuracilojn al la malsanulejo de Marambeka vilagho.

Ankaŭ mi dankas al Bart kiun la parto de la monon kiun li donacis en decembro daurigas la konstruadon de la Malsanulejo de Tiring’ati vilagho, kaj Multan dankon al S-ro Manolo Parra de Madrido kiun subtenis la konstruadon de la akushejo en Marambeka.

Akvo & putoj projekto: Multan dankon al la Franca asocio Solidareco Afriko Azio de Boris kiu daurigas la subtenon 2017, ni sukcesis konstrui 2 putojn,Kaj mi petas al la franca Asocio daurigi la subtenon por putoj en la jaro 2018 por ebligi nin konstrui multe pli da putoj en aliaj vilaghoj, ĉar mi jam ricevis multe da petoj de diversaj vilaghoj de nia provinco kiujn bezonas putojn kaj akvo basenoj.

Orfo-projekto: Chirkau 465 infanoj ricevis helpon de Mazingira en 2017 ,inter ili chirkau 36 orfoj ricevis helpon de Germanio, Nederlando, Belgio kaj 431 ricevis helpon de Francio pere de la Franca asocio Solidareco Afrika-Azio de Boris Bouchez kaj Maryvonne Robienau .Mi kore petas vin daurigu vian subtenon denove por la jaro 2018 .

Lernejo projekto: La konstruado de Esperanto mez-lernejo bonorde daŭris en 2017, mi dankas al niaj Nederlandaj samideanoj www.mazingira.nl kiuj subtenis la konstruadon de gastigejo por 80 knabinoj,la gastigejo kostis chirkau 55,000 Euroj, Samtempe mi kore dankas al Manfred Westermayer kun la AVE-anoj kiu ankaŭ kolektis la monon chirkau 6600 Euroj por konstrui alian gastigejon por 24 knabinoj kiun supozeble kostos 8000 ghis la la fino, tamen necesas ankaŭ la mono por konstruado de manghejo kaj kuirejo.

Por la la **venonta jaro** supozeble Esperanto mez-lernejo havos pli ol 400 gelernantojn do okazos granda manko de klas-chambroj ĉar ghis nun ekzistas nur 7 klas-chambroj pro tio mi daŭre petas vin daurigi vian helpon por tio kaj por konstruadoj de pliaj instruistaj loghejoj kaj bibliotekon.

Mikrokreditoj: Dank al tiu projekto, multaj vere profitis/as pruntepreni monon por starigi/daurigi siajn projektojn pri agrikultivado kaj bredado da kokinoj kaj bestoj ktp.

Arbarigo: Pro la suno mi ne plantis pliajn arbidojn, sed mi atendas ghis pluvos tiam mi povos daŭre kreskigi pliajn arbojn kiujn mi intencus planti sur la montaro Tiring'ati kaj utiligi arbarigon por Abel-bredado. *Fino (iomete redaktita por AVE de Manfred Westermayer)*

Mramba Simba Nyamkinda